INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA
1990 2025
35 jaroj
Katolika Sekcio de ĈEA

# DIO BENU

Gazeto de IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA
Agnoskita kiel laika eklezia organizaĵo

Jaro 2025 (35) Numero 1 (137)

## LA SANKTA SEĜO PUBLIKIGIS TEMON POR LA MONDA TAGO DE LA PACO 2025

Ĵaŭdon la 8-an de aŭgusto 2024 la vatikana Dikasterio por servo al integrala homa disvolviĝo publikigis temon de la 58-a Monda Tago de la Paco, kiu okazos la 1-an de januaro 2025: **„Pardonu al ni niajn kulpojn, donacu al ni vian pacon“**. La papo Francisko inspiriĝis per la Jubilea Jaro kaj li volis emfazi sencon de la persona konvertiĝo por ekrego de la vera paco.



En la gazetara deklaro tekstas, ke la temo estas inspirita per enciklikoj de la papo Francisko Laudato sí kaj Fratelli tutti, „ kaj antaŭ ĉio per nocioj espero kaj pardono, kiuj estas kerno de la Jubileo, de la tempo de konvertiĝo, kiu instigas nin, ke ni ne kondamnu, sed male ni alportadu repacigon kaj la pacon“.

*El Vatican News, 8.8.2024*

# LA PAPO AL LA SANKTA JARO: ESTU PILGRIMULOJ, LA KREDO ESTAS VOJO



„La Sankta Jaro devas en ni profundigi scion, ke la kredo estas pilgrimo kaj ke ni estas pilgrimuloj sur ĉi tiu Tero,“ skribis la papo enkonduke de antologio de siaj tekstoj pri la kredo komprenata kiel la vojo (“La fede è un viaggio“). La Sankta Patro kun plezuro konstatas, ke homoj en la nuna tempo denove malkovras perpiedajn pilgrimojn al Santiago, laŭ Via Francigena aŭ al Chartres en Francio.

La Sankta Patro memorigas, ke la pilgrimo ĉiam enhavas certan riskon. Li rimarkas, ke por ni, kiuj alkutimiĝis al rapida kaj komforta vojaĝo per aviadilo aŭ trajno, estas malfacile ekkompreni, kion la pilgimo signifis por niaj antaŭuloj. Ekiri la vojon signifis antaŭ mil jaroj riskon, ke la pilgrimulo neniam plu revenos hejmen, ĉar sur diversaj irvojetoj vin povis renkonti multaj danĝeroj. „La kredo de tiuj, kiuj decidis ekpilgrimi, estis pli forta ol iu ajn timo,“ skribas Francisko kaj li aldiras, ke „la pilgrimuloj de la pasinteco nin instruas fidi Dion, kiu ilin invitis, ke ili ekpilgrimu la vojon al tomboj de apostoloj, al la Sankta Lando aŭ al iu alia pilgrimloko. Ni petu la Sinjoron, ke ankaŭ ni havu iom da ĉi tiu fido, ke ni akceptu riskon fordoni nin en Lian volon kun konscio, ke estas tio volo de la bona Patro, kiu volas al siaj infanoj doni nur tion, kio estas por ili bona.“

La papo Francisko rimarkas, ke al la pilgrimo apartenas malfacilaĵoj. Tion scias ĉiuj, kiuj nuntempe revenas sur la pilgrimajn vojojn. Sed la doloro kaj laciĝo jam dumvoje estas kompensataj per beleco de la kreitaĵaro, per beleco de la arto aŭ per novaj interrilatoj, same kiel per momentoj de la aŭtentika malbruo kaj la profunda spirita vivo, kiuj en la hektika vivo de la nuna tempo ofte ne havas lokon.

La Sankta Patro samfoje memorigas, ke la pilgrimulo ne estas turisto aŭ nura vojaĝisto. Li havas klaran celon kaj samtempe li scias, ke atingo de la celo alportas plenan kontenton, ke la pilgrimo ne finiĝos, ĉar ĝia vera celo estas Dio mem, kiu restas neatingebla. Ĝuste tial ni devas esti senĉese survoje. Sed la movo direkten al Dio al ni donas vertiĝodonan certecon, ke Li nin atendas por doni al ni konsolon kaj gracon, aldiras la papo Francisko.

*Fonto: Vatican News, itala sekcio, 7.11.2024*

## PREĜO DE LA JUBILEO

Patro, kiu estas en la ĉielo,
la fido, kiun Vi donis al ni
pere de Via Filo Jesuo Kristo, nia frato,
kaj la flamo de amo,
verŝita en niajn korojn de la Sankta Spirito,
reveku en ni la benitan esperon
en la alveno de Via Regno.

Via graco transformu nin
en dediĉitajn kultivistojn de la evangeliaj semoj,
kiuj pli kreskigu la homaron kaj la tutan kosmon,
en fidoplena atendo
de novaj ĉieloj kaj teroj,
kiam venkitaj la potencoj de l' Malbono,
manifestiĝos Via gloro eterne.

La Jubilea graco
revivigu en ni, pilgrimantoj de espero,
la aspiron al spiritaj bonoj,
kaj surverŝu la tutan mondon
per la ĝojo kaj paco de nia Redemptoro.
Al Vi, eterne benata Dio,
estu laŭdo kaj gloro en ĉiuj jarcentoj.
Amen.

*Papo Francisko*

## KANTO NOVJARA

Dum la novjara noktomez'
jam luno glitis ŝove
ne gapu lunon, knab', sen ĉes',
komencu vivi nove.

Ĉi tion ĉiam diras mi
en tiu nokt' sorĉfama.
Post jarkomenco, aĥ, fikci',
plu ĉio estas sama.

Mi kiel vivis, vivas plu
kaj velkas bonintenco,
el tuta bonintenca flu'
ne venas jam eĉ penso.

Al azenet' min ligas am'
ĝi en malriĉ' humilis
kaj membrojn al Jesuinfan'
per spir' varmigi iris.

Mi boni volis en konkur'
kun tiu Dia besto
krom akvotrink' manĝanta nur
la kardojn en modesto.

Ĉi-jare ankaŭ mia spir'
Krist-manojn fridajn blovis.
Jesuinfan' kun trista mir'
medite lipojn movis:

„Kie vi estis ree, knab',
vol' via febla, vana!"
Hontiris mi kun klina kap'
de kripo Kristinfana.

*Tradukis Jiří Kořínek*
*(EK 1958)*

## La oratoro

– Gesinjoroj, mi prenas la parolon, por ke mia voĉo resonu en la tuta lando, de unu landlimo ĝis la alia, de la nordo ĝis la sudo, de la okcidento ĝis la oriento, kaj eĉ malproksime trans la landlimojn...!

*Voĉo el la publiko:* – Pli laŭte, mi petas!

# MALFORTA ĈENERO

Renkontiĝis du viroj kaj ilia interparolo ekrilatis ankaŭ la Eklezion kaj ankaŭ la papon, ne nur tiun ĉi nuntempan, sed ankaŭ tiujn antaŭajn, precipe mezepokajn.

„Se do mi vidas tiun ĝian ‚ĉefaron', mi ne donas al la Eklezio tro da ŝancoj," eldiris unu el ili. „Ho mi, kiam mi vidas, kiu jam la Eklezion direktis, do mi estas tute sen timzorgo pri ĝia estonteco," ekridetis la dua.

La unua nur rulis la okulojn.

„Ĉiu ĉeno estas tiel fortika, kiel fortika estas ĝia plej malfortika ĉenero," daŭrigis la parolon la dua. „Kaj en ĉeno de la papoj tiu plej malfortika ĉenero estis tuj tiu la unua. Kiu plua papo neis – kaj tion tuj trifoje – Jesuon tiel kiel Petro? Tiel, se la Eklezio persistis jam eĉ tion..."

Bonŝance por la Eklezio, eĉ por ni: Ĝi ne apogas sin nur je ni homoj, sed precipe je tiu, kiu ĝin fondis dirinte: „Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi." Kaj poste li promesis: „Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo!" (La finaj vortoj de Jesuo el la evangelio de Mateo - Mat 28,18-20). Kaj ĉar tiu, kiu tion diris, estas enkorpiĝinta Dio, oni povas centprocente lian promeson plenfidi – malgraŭ tio, ke je ni homoj, el kiuj li sian Eklezion kreas, tro da fido ne estas.

*Sac. Pavel Zahradníček*
*El Milujte se (n-ro 70/2024)*

*„Se ni meditas pri egaj atakoj, kiujn la Eklezio transvivis, nur malfacile ni povas al ni imagi, kiamaniere ĝi povus neniiĝi." (lordo Macaulay)*

*Pri la Eklezio vi ne devas timi – ĝi havas Dian promeson, ke ĝi ekzistos ĝis fino de la mondo. Timu (sed sane) pri vi kaj via eterna vivo, ĉar „...mallarĝa estas la pordo kaj malvastigita estas la vojo kondukanta al la vivo, kaj malmultaj ĝin trovas." (Mat 7,14)*

*„Ju pli multe ni estas kunigitaj kun la Eklezio, des pli multe ni estas kunigitaj kun la Sankta Spirito, kiu ĝin vivigas. Ju pli ni amas la Eklezion, des pli ni amas tiun, kies ĝi estas la korpo: nian Sinjoron Jesuon Kriston." (s-ta Charles de Foucauld – origine oficiro de la franca armeo, poste trapista monaĥo, katolika sacerdoto, ermito en Saharo).*

# PORTAS KRUCON FIL´ DE DIO

Portas krucon Fil' de Dio
Dorna krono sur tempio.
Mokoj, krioj de soldatoj,
Sangas Korpo pro la batoj.

Jen doloro, jen sufero,
pro la pek' de l' hom' sur tero.
Kristo niajn pekojn portas,
agonias, pro ni mortas.

Ho Jesuo, ho Sinjoro,
Granda estas la doloro.
Ni pekuloj Vin adoras,
kaj animoj niaj ploras.

*Bogusław Sobol*



*Monto de la Krucoj en Litovio*

# ASTRONAŬTO HOPKINS: EUĤARISTIO ESTIS POR MI EN KOSMO KONSOLO

„Ĉiumatene antaŭ eliro en kosmon, antaŭ ol mi en malbruo de la kosma stacio komencis vestiĝi, mi akceptis sanktan komunion kune kun konscio, ke okazu kio ajn dum sekvaj 15 horoj, Jesuo estas kun mi.“ La usona astronaŭto Mike Hopkins ekparolis en Nacia Eŭkaristia Kongreso en Usono pri tio, kiel grava por li estis akcepto de Eŭkaristio dum la kosma misio.




Mike Hopkins elkreskis en protestanta familio, sed post kiam li edziĝis kun katolikino, li decidis siajn filojn eduki en la katolika kredo. Dum serĉa tempo li mem enviciĝis en riton de la kristana inicio de plenkreskuloj (RCIA) kaj en la jaro 2012 li membriĝis en la katolika eklezio.

Kiel astronaŭto li pasigas longajn periodojn en kosmo, kie li plenumis gravajn misiojn. Sed danke al la katolika kredo li scias, ke la Eŭkaristio estas necesega nutraĵo, kiu fortigas animon kaj koron dum ĉiu momento.

Dum sia atesto en la 10-a Nacia Eŭkaristia Kongreso en Usono Mike Hopkins parolis pri tio, kiel grandan influon al li kaŭzis Eŭkaristio, post kiam li estis en septembro 2013 kiel kosmonaŭto sendita al sia unua misio en Internacia Kosma Stacio.

„Josuo 1,9 diras: ‚Jen Mi ordonas al vi: estu forta kaj kuraĝa, ne havu teruron kaj ne timu, ĉar kun vi estas la Eternulo, via Dio, ĉie, kien vi iros.’ Kaj mi kredas, ke tio inkluzivas eĉ lokojn ekster la Tero,“ komencis Mike sian ateston. „La plej forta memorigo de tio, ke Dio estas kun mi, venis por mi en formo de Eŭkaristio,“ diris Mike.

„Unu el la plej danĝeraj agadoj, kiujn kiel kosmonaŭtoj ni faras, estas t.n. spacewalk aŭ eliroj en kosmon. Kaj mi el pordo de Internacia Kosma Stacio eliris kvinfoje kaj mi travivis 32 horojn ekstere en la kosma vakuo.“

„Kaj ĉiumatene antaŭ eliro en la kosmon, antaŭ ol mi en kvieto de nia kajuto komencis vestiĝi, mi akceptis la sanktan komunion kun la konscio, ke dum sekvaj 15 horoj okazu kio ajn, Jesuo estas kun mi.“

Kun transporto de transsubstanciigitaj hostioj al li helpis lia paroĥestro kaj specialan permeson li ricevis el ĉefdiocezo Galveston-Houston.

„Eble vi ne kapablas al vi imagi, kiel grandan konsolon tio al mi donadis,“ li sciigis kaj li aldiris, ke li la hostiojn havis en malgranda piksidio lokigita en skafandro proksime al koro.

*Fonto: Churchpop*

*Rubriko: Ĉefaj informoj, Vatikano kaj eksterlando, interparoloj, atestoj, komentoj, 25. 7. 2024*

# EĈ POST 55 JAROJ

Eĉ 55 jarojn post komenco de la organizado de la katolikaj E-tendaroj en la jaro 1969 en la vilaĝo Herbortice (Ĉeĥio) okazis la 19-an de oktobro 2024 plua renkontiĝo de la ekstendaranoj. Partoprenis ĝin grupo de 32 personoj – la ekstendaranoj el la Ĉeĥa Respubliko. Kelkaj kun bedaŭro anoncis maleblon partopreni pro diversaj kaŭzoj. La promesitan ĉeeston devis pro ekestinta grava tasko nuligi ankaŭ nia karega kaj ĉiam fidela ekstendarano – la episkopo de la urbo Olomouc Mons. Antonín Basler. Tamen la partopreno de la 32 ekstendaranoj post tiel longa tempo ĝojigis ne nur la organizantojn de la renkontiĝo, sed ankaŭ la partoprenantojn mem.



*La ĵus kolektiĝintaj ekstendaranoj antaŭ la iama gastejo de la geedzoj Minář*

La alvenintaj partoprenantoj unue kolektiĝis antaŭ la bone konata gastejo de la geedzoj Bořivoj kaj Miluše Minář, kiuj dum ĉiuj naŭ tendaroj preparis por la tendaranoj bongustajn tagmanĝojn. Post la antaŭtagmeza lernado de Esperanto en la apartaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj, la tendaranoj iris duonkilometron por tagmanĝi. Kaj ilia filino Miluŝka estas ĉeforganizantino de la nuna renkontiĝo de la ekstendaranoj. Kaj tie, apud la gastejo de geedzoj Minář ni ilin rememoris (vidu foton).

Poste la ekstendaranoj kolektiĝis sur la herbejo, kie ili travivis neforgeseblajn vivtravivaĵojn en naŭ tendaroj en la jaroj 1969-1977, antaŭ ol la tendaro en la jaro 1977 estis likvidita fare de invado de la fifama komunista polico StB. La eksorganizanto de la tendaroj kaj la ekstendarestro frato Miloslav Šváček memorigis al la ĉeestantoj gravajn tendarajn okazintaĵojn, kiam la tendaron partoprenis pastroj Battista Cadei kaj Arturo Bellini el Italio, celebrintaj dimanĉe por la paroĥanoj kaj la tendaranoj en plenplena preĝejo en Cotkytle la sanktan meson, kio tiutempe en okuloj de la komunistaj regantoj estis grandega krimo. Danke al Dio estis neniu denuncanto. Kaj kiam geedzoj Thun – la meritaj anoj de la komunista partio, loĝantaj en al la tendaro proksima domo – savis la tendaron por pluaj du jaroj. Nu kaj estis memorigitaj okazintaĵoj de la lasta tendaro 1977, kiam okazis invado

de la komunistaj StB-anoj. Tiam ili kriegis al la tendarestro Miloŝ, ĉu li konsciiĝas, kiel longe daŭros, ol la junaj tendaranoj liberiĝos de la tendara influo. Danke al Dio, eĉ post 55 jaroj la tendara spirito plu vivas, kiel tion dokumentas ĵus okazanta renkontiĝo.

Post vizito de la iama tendarloko, la ekstendaranoj translokiĝis al la apuda vilaĝo Cotkytle, kie en la loka kulturdomo okazis bongusta kaj abunda tagmanĝo, kiun prizorgis la ĉeforganizantino de la renkontiĝo fratino Miluše Jílková, filino de la geedzoj Bořivoj kaj Miluše Minář el Herbortice. Dum tiea trihora ĉeesto la ekstendaranoj havis eblon priparoli ne nur la tendarajn travivaĵojn, sed ĉion alian rilatantan ilian ĝisnunan vivon.



Kaj sekvis vizito de la loka preĝejo de la sankta Johano Nepomuceno en Cotkytle, kiun tre bone la tendaranoj memoras. Nur en la unua tendaro okazis oficialaj matenaj sanktaj mesoj en la tendaro, kiujn celebris la novpastro – esperantisto Ladislav Škrňa, kiun en la tendaron sendis la praga ĉefepiskopo František Tomášek. Kaj en la lasta tendaro celebris la sanktajn mesojn antaŭ la oficiala matena vekiĝo en la tendaro la pastro



Józef Zielonka el Pollando. Dum ceteraj tendaroj la tendaraj volontuloj ĉiumatene piediris al la preĝejo en Cotkytle por partopreni la sanktan meson.

Eĉ se ne povis okazi la sankta meso, kiel antaŭ kvin jaroj, kiun tiam celebris kun pluaj du pastroj ankaŭ ekstendaranoj la episkopo Antonín Basler, la ĉeestantaj ekstendaranoj preĝis la rozarian preĝon memorante dum ĝi la forpasintajn iamajn tendaranojn. Kaj post ĉiu rozaria dekumo sekvis kanto akompananta per gitarludo.



Koregan dankon por la belega kaj sukcesa renkontiĝo meritas precipe fratino Miluška Minářová, ŝia edzo kaj filino, kaj ĉiuj, kiuj iamaniere helpis aranĝi la belan renkontiĝon de la ekstendaranoj en la 55-jara tendara datreveno.



*Liduška Rašnerová transdonas danke al Miluška rozon*



*La organizantino de la renkontiĝo Miluška Jílková (Minářová) kun sia edzo*

La renkontiĝo de la ekstendaranoj estis tre bela kaj agrabla okazaĵo, kiu tre plaĉis al ĉiuj. La partoprenintoj adiaŭis sin kun deziro estonte denove okazigi ĝin. Do karegaj gefratoj – ekstendaranoj: Ĝis la revido denove en Herbortice! Dio benu!

*Miloslav Šváček*

# SEKSA PERFORTO: ĈIEPRESA REALECO EN DEMOKRATIA RESPUBLIKO KONGOLANDO

Seksaj perfortoj, tio estas malutilaj agoj, kiuj estas faritaj kontraŭ persono aŭ malgranda grupo de homoj pro la sekso, konsistigas socian realecon en Demokratia Respubliko Kongolando. Virino kaj junulino estas la ĉefaj viktimoj en ĉiuj siaj formoj kaj en preskaŭ ĉiuj sektoroj de la vivo, precipe ene de la familio, en la socia medio, en profesiaj rilatoj, ene de bazaj, mezaj kaj superaj lernejoj. Ĉi tio estas problemo tiel centra kiel tabua kaj unu el kies gravaj dimensioj kuŝas en la timo de viktimoj esprimi tion, kion ili suferas, pro timo de reprezalioj de la perfortuloj, kiuj ĝenerale havas la aŭtoritaton super ili: edzoj, hierarkiaj superuloj, instruistoj, rekrutistoj, ktp.



Estas ankaŭ la fakto, ke entute viktimoj estas konvinkitaj, ke ili ne havas efikajn jurajn rimedojn, kiuj povas alporti al ili justecon. Ĉiuj ĉi tiuj elementoj tendencas konduki al nediskonigo kaj nesankciado de agoj faritaj kontraŭ virinoj. La leĝo celas plenigi mankon de teksto traktanta ĝenerale pri la perforto kontraŭ virinoj (krom la seksperforto), la rimedojn por malhelpi kaj puni ĝin por certigi, ke virinoj havu klimaton de serena vivo. Ĝi ankaŭ emfazas seksan ĉikanadon, kiun ĝi traktas en multe pli eksplicita maniero.

Koncerne la sankcion, la leĝo traktas la demandon el la angulo de la krima proceduro. La du proceduroj povas okazi paralele sur la samaj faktoj: la krimjuĝisto respondecas pri juĝado kaj sankcio de civitano laŭ ĝeneralaj reguloj, sed ne interveni en la situacio de la krimulo koncerne lian karieron kaj lian agadon, kiuj submetiĝas la administra procedo. Ĉi tiu leĝo trankviligas viktimojn kaj donas al ili la senton legitime esprimi sin kaj prezenti kaj krimajn kaj disciplinajn plendojn. La kreado de specialaj servoj ĝuantaj sendependecon de bazaj, mezaj, superaj kaj universitataj instruejoj, same kiel jura helpo al plendantoj en iniciatado de proceduroj estas klare necesa.

La seksa perforto restas malĝoja realaĵo en Demokratia Respubliko Kongolando. Malgraŭ la klopodoj faritaj, virinoj kaj knabinoj daŭre estas la ĉefaj viktimoj de diskriminacio kaj perforto en ĉiuj sektoroj de la socio. Tiuj ĉi malutilaj agoj faritaj pro la sekso manifestiĝas en malsamaj formoj kaj estas profunde enradikiĝintaj en iliaj ĉiutagaj spertoj. La rezulto estas konstanta marĝenigo de kongolandaj virinoj, kiuj ofte estas devigitaj silenti pro manko de taŭga protekto kaj efikaj juraj rimedoj. En ĉi tiu kunteksto ni ankaŭ dankas senatanon Profesoron Modeste Lukwebo, kiu subtenis ĉi tiun leĝon defendantan sekson en la kongolanda registaro. Ĉi tiu proponita leĝo venas en la ĝusta tempo por plenigi decidan juran breĉon. Ĉi tiu leĝaro estas bonvenigita kun fervoro fare de virinaj organizoj kaj kongolanda burĝa socio.

La seksa perforto inkluzivas ĉiujn perfortajn agojn, kiuj celas individuojn pro ilia sekso. Ĉi tiu perforto, ĉu fizika, psikologia

aŭ seksa, estas ofte farita kontraŭ virinoj kaj knabinoj, kiuj trovas sin aparte vundeblaj en patriarka socio, kiel estas tiu de Demokratia Respubliko Kongolando. La familia medio, profesiaj rilatoj kaj edukaj institucioj ofte estas la spacoj, kie tiu perforto plej manifestiĝas, tiel plifortigante la subigon de virinoj kaj junaj knabinoj. Ĉi tiu perforto estas multfaceta fenomeno, ankrita en potenco-rilatoj inter la seksoj kaj plejparte nutrita per kultura kaj politika ekonomia dinamiko.

La kunteksto de armitaj konfliktoj, precipe orientparte de la lando, pliseverigis ĉi tiun situacion, igante virinojn kaj junajn knabinojn ĉefaj celoj de seksa perforto. Tamen, preter konfliktzonoj, la seksa perforto fariĝis intencita en privata, publika kaj profesia sferoj. Ili rezultas en seksĉikanado en la laborejo, fizika kaj vorta misuzo en la hejmo, malvolaj geedziĝoj, kaj multaj aliaj degradaj agoj.

Hejmaj perfortoj estas unu el la plej disvastigitaj formoj de seksa perforto en Demokratia Respubliko Kongolando. Ili ĉefe okazas ene de hejmoj, spaco supozata esti loko de sekureco por virinoj kaj infanoj, sed kiu en multaj kazoj iĝas sceno de ĉiutaga perforto. Edzinoj, ofte ekonomie dependaj de siaj edzoj, suferas fizikan, psikologian kaj foje seksan perforton, faritan de iliaj edzoj aŭ aliaj familianoj. En manko de efikaj akceptaj strukturoj kaj fidinda jura sistemo, la viktimoj ofte trovas sin senrimedaj, kaptitaj en ciklo de perforto.

En lernejoj, junaj knabinoj ofte estas viktimoj de seksĉikanado de siaj instruistoj, komencante en bazlernejo kaj mezlernejo. Ĉi tiuj misuzoj, malofte raportitaj, influas ne nur ilian psikologian bonfarton, sed ankaŭ ilian akademian rendimenton. En universitatoj la rilatoj inter profesoroj kaj studentoj foje estas nuancitaj per implicaj minacoj: la silento de la viktimoj estas nutrita de la timo de reprezalioj aŭ akademia fiasko trudita de iliaj atakantoj. Edukaj institucioj, kiel entreprenoj kaj familiaj spacoj, iĝas medioj de silenta subpremo por miloj da virinoj ĉiutage.

### Seksa ĉikanado: Silenta epidemio

Seksa ĉikanado en profesiaj kaj akademiaj medioj konsistigas alian formon de perforto ofte raportita, sed malofte denuncita. Multaj virinoj serĉantaj dungon aŭ profesian progreson estas submetitaj al nepetitaj progresoj aŭ seksa premo de siaj superuloj. Tiu ĉi ĉikanado estas tre disvastigita ankaŭ en instruejoj, kie studentoj estas foje devigitaj cedi al la progresoj de siaj instruistoj por akiri bonajn notojn aŭ bone trapasi siajn ekzamenojn. Timo de profesiaj aŭ akademiaj reprezalioj, kunligita kun la manko de efikaj rimedoj, ofte malhelpas viktimojn raporti tiujn fitraktadojn.

### Plago eksplicite kondamnita

Fine, unu el la plej novigaj aspektoj de la leĝo cerbumita de sinjoro Bahati Lukwebo estas ĝia eksplicita traktado de seksĉikanado. Dum ĉi tiu fenomeno estas ĉiea en la kongolanda socio, ĝi restas unu el la malplej denuncataj aspektoj de seksa perforto.

*Elkore Honoré Sebuhoro*
*(honsebn@gmail.com) DR Kongolando*

## NEEBLE

Inspektoro de la impostoj sonorigas ĉe la familio Viktim. Eta knabo venas malfermi la pordon.

– Ĉu vi povas voki vian patron?


– Li forestas, sinjoro, mi sola estas hejme, ruĝiĝante flustras la etulo.

– Sed tamen mi vidas, ke lia ĉapelo pendas sur la hokaro.

– Jes, sinjoro, sed paĉjo ne povas stari en la vestoŝranko kun la ĉapelo sur sia kapo!

# GOLGOTO DE PASTRO JERZY POPIEŁUSZKO

Ege influantaj je la konscienco de la socio, ekdominigitaj flanke de la maldekstra maniero de la pensado, amaskomunikiloj en Pollando ne volas memori, ke la ĉefa kontraŭulo de la komunisma ŝtato en nia



lando estis la katolika eklezio. Jen ĝuste ĝi metis la plej grandajn meritojn en la verko de la malfortigado de la totalisma sistemo. La simboloj de ĉi tiu batalo por libereco estas la sacerdotoj kiel: sankta Johano Paŭlo la Dua, beata Stefano Kardinalo Wyszyński kaj beata Jerzy (Georgo) Popiełuszko. Ĉi tiu lasta la batalon por la libereco de la eklezio kaj nacio pagis per sia martireca morto.

Kvankam pastro Jerzy ne estis la unu-nura sacerdoto, kiun la potenculoj de Pola Popola Respubliko (PRL) rekonigadis kiel sian danĝeran kontraŭulon, ĝuste lin oni decidis unuavice „neniigi“. Lia animzorga laboro, helpo al laboristoj kaj aktivuloj de sindikatoj persekutataj fare de la komunisma reĝimo, arigantaj homamasojn dum sanktaj mesoj intence de Patrujo, kiujn li celebradis en la preĝejo de la sankta Stanislavo Kostka en Varsovio, predikoj, en kiuj li postulis homan respekton kaj veron, vekigis malamikecon de polaj servaĉuloj de Sovetunio, kaj eĉ de Kremlo mem. Kiam la sekretaj servoj ne sukcesis kompromiti la sacerdoton kiel la supozitan revoluciulon kaj teroriston, kiun celis planita „provoko en Członna-strato“, do alporto de armiloj, eksplodiloj kaj malleĝaj faldfolioj kaj lokigitaj en la hejmo de pastro Popiełuszko, la funkciuloj batalantaj kontraŭ la eklezio el la Ministerio de Enlandaj Aferoj (MSW) ekkomencis agojn por murdi lin. Tiu ĉi tasko estis konfidita al tri oficiroj de Sekureca Servo (SB).

Kapitano Grzegorz Piotrowski, leŭtenanto Leszek Pękala kaj leŭtenanto Waldemar Czmielewski la atencon kontraŭ la animzorganto de laboristaro ekigis la 13-an de oktobro 1984. Kaŝinte la vizaĝon per la ĉapelo de kamentubisto, Piotrowski eksaltis en ŝoseon ĵetinte brikon kontraŭ flanko de la aŭtomobilo, en kiu vojaĝis pastro Jerzy. Li intencis rompi fenestron kaj tiamaniere okazigi averion de la aŭtomobilo.



Sed li ne sukcesis. La stiristo de la sacerdoto, Waldemar Czrostowski, ekagis tre konscie, ekstirante tre rapide veturantan

aŭtomobilon flanken de la agresanto, kiu perdis memcertecon kaj miscelis la ĵeton. Malgraŭ malsukceso SB-anoj ne forlasis siajn planojn.



## FORKAPTO

La tempo de lasta provo venis la 19-an de oktobro 1984. Pastro Jerzy (Georgo) estis revenanta el la urbo Bydgoszcz, kie je la invito de animzorgado de laboristoj li celebris la sanktan meson en la paroĥo de polaj sanktuloj Fratoj Martiroj. La aŭtomobilon Volkswagen Golf denove stiris Waldemaro Czrostowski.

Piotrowski, Pękala kaj Czmielewski ekveturis sekvante ilin per aŭtomobilo Fiat 125p. Ili havis ĉe si kromajn registrajn aŭtomobilajn tabuletojn, ŝnuron, plastron, eteron, katenojn, pistolojn kaj sakon kun ŝtonoj... Czmielewski vestiĝis per uniformo de MO (civitana milico) − vojkontrolisto.

Iumomente, survoje al la urbo Toruń, SB-aŭtomobilo ekfulmis kelkfoje per lumiloj. Vidinte ene uniformitan funkciulon de MO donantan signon, por ke ili ekveturu flanken, P. Jerzy sin turnis al Czrostowski:

Haltu, ĉar ni povas havi malfacilaĵojn.

La stiristo haltis flanke de la ŝoseo. Okazis tio en senkonstruaĵa tereno, en la teritorio de vilaĝo Górsk. SB-anoj ŝajnigante la kontrolon de sobreco, sidigis la stiriston Czrostowski sur la antaŭan seĝon de ilia aŭtomobilo Fiat, post kio ili katenigis lin, ŝtopigis lian buŝon kaj timigadis lin per pistolo.

Tuj poste ili okupiĝis pri pastro Popiełuszko. Ili perforte elaŭtigis lin kaj kondukis lin al sia deĵora aŭtomobilo.

„Sinjoroj, kial vi min tiel traktas“ – ekdemandis la sacerdoto.

Respondante kapitano Piotrowski komencis batadi lian kapon kaj nukon per ligna bastono. Pastro Jerzy falis kaj perdis konsciencon. Tiam SB-anoj kunkatenigis lin per ŝnuro, buŝŝtopigis per gazo, kaj post tio enmetis lin en pakaĵujon kaj ekvojaĝis.

## MARTIRA VOJO

La katenigita Waldemaro Czrostowski observis atente la vojon. El la minacoj de SB-anoj rezultis, ke ili volas same mortigi lin, kiel ankaŭ la sacerdoton. Kiam do ili preterpasis veturantan la saman direkton aŭtomobilon Fiat 126p, kaj ĉe la vojrando ekaperis siluetoj de du viroj starantaj ĉe motorciklo, li tuj malfermis la pordon kaj eskapis sur ŝoseon. Vundita, li ekkuris serĉi savon por pastro Jerzy. SB-anoj, timante, ke ili povas esti rekonataj fare de atestantoj, ne haltiĝis.



Dum ĉi tiu tempo la animzorganto de Solidareco reakiris konsciencon kaj komencis premadi la volvon de la bagaĝujo.

SB-anoj venis do al aŭtoparkejo proksime de la gastejo „Kosmos“ en Toruno. Kiam Pękala malfermis bagaĝujon, la sacerdoto, kiu pli frue liberiĝis en ligoj, eskapis eksteren kaj komencis fuĝi. Li vokis ĉe tio pri helpo. Bedaŭrinde, vane. Piotrowski rapide kuratingis pastron kaj batadis lian kapon per bastono ĝis la perdo de la konscio de la pastro. Tiam SB-anoj denove ŝtopis lian buŝon kaj ekkatenis manojn kaj piedojn de la animzorganto de Solidareco, kaj enĵetinte lin en bagaĝujon, ili daŭrigis la veturon. Post travojaĝo de la urbo Toruń ili direktiĝis al la urbo Włocławek.

Pastro Jerzy denove reakiris konsciencon, kiam funkciuloj haltis proksime de benzinstacio por aĉeti oleon. Denove komencis li la malesperigan provon malfermi la volvon de bagaĝujo. Ekatentinte tion, SB-anoj veturis kelkcent metrojn plien kaj parkigis aŭtomobilon en ĉevojaj veproj. Ili la sacerdoton metis sur herbejon kaj Piotrowski denove komencis batadi lin per bastono. Li ekminacis lin, se li ne trankviliĝos, li mortpafos lin. La rezulto estis tia, ke la korpo de la senkonscia pastro Popiełuszko denove estis metita en la bagaĝujon.

Post iu tempo la situacio ripetiĝis. Malgraŭ kunligiloj la pastro Jerzy denove provis liberiĝi. La frapojn sur la klapon ekaŭdis SB-anoj. Post halto de la aŭtomobilo randvoje kapitano denove komencis turmenti malliberulon. Kiam li malmoviĝis, ili glufermis lian ekkatenitan buŝon, kaj al kolo ili metigis ŝnuran maŝon, kaj kunligis al li piedojn. Ĉiuj provoj pri rektigo de la korpo devis rezulti en sufoko de la viktimo. Aldone al la piedoj de la sacerdoto ili alligis la ujon kun ŝtonoj.

## NASKIĜO POR ĈIELO

Nun venis la lasta etapo de la martirigo. La MO-aŭtomobilo estis alveturinta al la akvobaraĵo de la rivero Vistulo en la urbo Włocławek. Tie SB-anoj eltiris la senkonscian pastron Jerzy el la bagaĝujo kaj ĵetis en akvon. Li tiam ankoraŭ estis vivanta...




Post fino de la sanga laboraĉo, la murdistoj revenis al Varsovio, regalante sin dumvoje per vodko.

* * *

Por katolikoj estas antaŭ ĉio grava la atesto de la pastro Jerzy Popiełuszko, Diservanto, zorginto pri la sorto de la samlandanoj subpremataj fare de la totalisma ateisma ŝtato.

Bedaŭrinde, maleble estas reakiri pensojn, preĝojn kaj sentojn de tiu ĉi sacerdoto. Kiel senkulpa kaj sendefenda viktimo li estiĝis la inspiro por poloj en batalo per pacaj iloj por libereco por la Eklezio kaj por la civitanoj. Tiamaniere la ordinara, sed distingiĝanta per la varmega kredo la sacerdoto estiĝis la grajno, kiu alportis la frukton en formo de reakiro de la sendependeco de Pollando.

## EPILOGO

La 6-an de junio 2010 la pastro Jerzy (Georgo) Popiełuszko estis beatigita. La ceremonion de la beatproklamo ĉeestis 150 mil fideluloj arigitaj sur la Placo de Marŝalo Piłsudski en Varsovio.

*Adam Kowalik*
*El revuo Przymierze z Maryją, 138/2024*
*Esperantigis Stanisław Śmigielski*

# LARMOJ DE MARIA

La Dipatrino elektas diversajn manierojn por transdoni al homoj gravan mesaĝon. En Akita en Japanio ŝi ne revelaciis senpere, sed ŝi priservis sin per diversaj signoj, kiuj tre klare atestis ŝiajn vortojn kaj petojn.



*Fratulino Agnes Katsuko Sasagawa*

Fratulino Agnesa Katsuko Sasagawa kiel junulino kaŭze de malbone farita operacio estis paralizigita. Ŝia stato estis tre malfacila kaj kuracistoj dum dek ses jaroj ne povis iamaniere helpi ŝin. Sed kiam klostraj fratulinoj alportis al ŝi la akvon el Lurdo kaj donis al ŝi trinki ĝin, ŝi estis resanigita. Ŝi eniris monaĥinejon de Servistinoj de Eŭkaristio kaj ŝi iĝis katekistino. Tamen ŝi tute perdis aŭdpovon. Ŝi ne povis labori, tial ŝi estis translokigita al la monaĥinejo en Akita.

La 12-an de junio 1973 ŝi preĝis en kapelo kaj tuj blindigis ŝin la lumo, kiu eliĝis el tabernaklo. Tio ripetiĝis dum du tagoj. Aldone ŝi ekvidis anĝelojn adorantajn Jesuon en la Plejsankta Sakramento. Ŝi informis pri tio pastron, kiu ordonis al ŝi al neniu pri tio diri, kaj ŝi kun humileco tion akceptis. La 30-an de junio sur la maldekstra manplato de fratulino Agnesa aperis vundo en la formo de kruco, kiu kaŭzis grandan doloron. Kelkajn tagojn pli poste, preĝante en la kapelo, ŝi ekaŭdis en sia koro la vortojn de Dipatrino: „Filino, mia novicino, vi estis obeema al mi kaj vi perdis ĉion, por iri kun mi. Ĉu la perdo de aŭdpovo estas malfacila? Estu certa, via surdeco estas kuracota. Ne perdu paciencon. Tio estas lasta provo. Ĉu vundo sur la manplato kaŭzas al vi doloron? Preĝu por la pardono de homaj pekoj. (...) Preĝu por papo, episkopoj kaj sacerdotoj“. La saman tagon fratulinoj ekvidis, ke el la manplato de la statuo de Dipatrino, staranta en la kapelo, elfluas sango. Ekaperis ankaŭ sur ĝi la sama vundo en la formo de la kruco, kia estis sur la manplato de la fratulino Agnesa. Tiam la vundo ĉe fratulino malaperis.

Je la dua fojo ŝi ekaŭdis la vortojn de Maria: „Filino mia, mia novicino, ĉu vi amas Sinjoron? Se vi Lin amas, elaŭdu, kion mi diros al vi. Tio estas grava kaj vi



*La ploranta statuo de V. Maria en Akita*



devas tion transdoni al via superulo. Multaj homoj en ĉi tiu mondo vundas la Sinjoron. (...) Mi deziras kun mia Filo la animojn, kiuj per siaj suferoj kaj mizereco savos la pekulojn kaj maldankulojn.(...) Ĉiu strebu laŭ eblecoj tute sin oferdoni al Dio. Ĉiu preĝo estas nepra. Animoj, kiuj sopiras preĝadi, estas jam survoje al unuiĝo. Ne alligu tro multe da formo por mildigi la Sinjoron, estu en la preĝo sindona kaj fervora".

Kiam malaperis la spuro sur la manplato de la statuo de Maria, komencis eliĝi el ĝi la fluidaĵo havanta la agrablan aromon de rozoj, violoj kaj lilioj. La 13-an de oktobro 1974 la fratulino Agnesa reakiris la aŭdkapablon. Kaj Dipatrino alparolis ŝin trian fojon kaj lastfoje. Ĉi-foje ŝi anoncis, kio okazos, se homoj ne pliboniĝos. Ŝi diris pri la persekutadoj de la Eklezio, neniigoj de altaroj kaj pri tio, kiel forte la malbona spirito batalos por malproksimigi la animojn de Dio. Ŝi petis pri preĝado de rozario por la papo, episkopoj kaj sacerdotoj. La 4-an de januaro 1975 el okuloj de la statuo de la Patrino Plejsankta komencis elflui larmoj. La anĝelo, kiu sin aperis al fratulino Agnesa, klarigis al ŝi, ke Maria ploras, ĉar ŝi volas konvertiĝon de granda aro da personoj, kaj por ke pli multe da personoj pere de ŝi redonu sin al Dio la Patro kaj al la Sinjoro Jesuo. La statuo ploris pli ol centfoje, kaj vidis tion du mil personoj.

En la jaro 1984 post multaj esploroj la loka episkopo konfirmis, ke tiuj ĉi eventoj estas eksterordinaraj okazintaĵoj. La papo Francisko antaŭ kelkaj jaroj elektis la sanktejon en Akita kiel lokon precipe por preĝado por la paco kaj finigo de militaj agadoj en Proksima Oriento. La preĝado alportis fruktojn, ĉar ne realiĝis la bombado de Sirio kaj pri Akita povis aŭdi homoj sur la tuta mondo.

*Magdalena Buczek*

*El taggazeto Nasz Dziennik, dla dzieci: W ogrodzie Maryi, julio 2021.*

*Esperantigis Stanisław Śmigielski*

## Sopiro

Instruisto diris: „Se vi sopiras pri Dio, Dio al vi venos!"

Lernanto ne tute bone ekkomprenis la instruiston. Iun tagon ambaŭ sin banis en rivero kaj la instruisto diris: „Subakviĝu!" kaj la lernanto tion faris. Tiumomente la instruisto staranta apud li tenis lin sub la akvo, ĝis la lernanto estis tute elĉerpita. Poste li lasis lin.

„Kion vi tie sub la akvo sentis?"

„Sopiron ekspiri."

„Ĉu vi sopiras pri Dio samforte?"

„Ne."

„Nur kiam via sopiro estos same forta, vi Dion trovos."

*Ramakriŝna († 1886)*

# DIPATRINO EL KOŹLE

La mirakla bildo de Dipatrino el Koźle (Pollando) estas la plej malnova portreto de Maria el la diocezo de Opole. Ĝi estis kreita en Ĉeĥio, plej probable en la urbo Olomouc, en la jaroj 1420-1430, per disvastigita tiam tempera tekniko sur la tilia tabulo. Ne estas sciate, kiu ĝin desegnis, kiamaniere kaj pro kio ĝi ektroviĝis fine de la dekkvina jarcento en la preĝejo de sankta Sigismundo (nune ankaŭ de sankta Hedviga la Silezia) en la nuntempa urbo Kędzierzyn-Koźle en la suda Pollando.

Unu el legendoj anoncas, ke la komandanto de la fortreso Koźle ekatakis la terkulturiston transportantan la bildon volante aĉeti la pentraĵon por la konkreta sanktejo, sed tiu ne volis vendi la portreton de Maria kun Jesu-Infaneto. Tamen la sekvan matenon okazis, ke dumnokte estiĝis miraklo kaj restas... du bildoj! Tiam la terkulturisto ne plu kontraŭstaris: unu bildon li kunprenis kaj la duan postlasis en la fortreso.

Baldaŭ la bildo estis transdonita al la plej malnova parto de la sanktejo en Koźle – la kapelo de la Plejsankta Maria Virgulino. Tiam ankaŭ estis fondita Kongregacio de Vizitado de la Plejsankta Maria Virgulino, kies tasko estis partoprenado en diservoj honore al Maria kaj la disvastigado de la kulto de Dipatrino. Jam en la duono de la dekkvina jarcento estis kreitaj kelkaj kopiaĵoj de ĉi tiu bildo, kiuj trovis sian lokigon en la preĝejoj en la lokoj Bytom, Kłobuck kaj Piekary Śląskie.

La eklezaj dokumentoj el la komenco de la dekoka jarcento atestas, ke la nekonata persono realigis lokigon de preskaŭ cent multekostaj ŝtonetoj en arĝentan kronon kaj vestaĵon, per kiuj estis ornamitaj figuroj de la Plejsankta Maria kaj de Infaneto Jesuo.

Ekde la jaro 1996 antaŭ ĉi tiu mirakla bildo okazadas regulaj (nun ĉiumerkrede) diservoj honore al la Plejsankta Virgulino Maria, kaj la paroĥestro D-ro Alfonso Schubert verkis la specialan preĝon honore al la Dipatrino de Koźle.

En la jaro 2003 dum la pilgrimo de paroĥanoj al Vatikano, la kopiaĵo de ĉi tiu bildo estis transdonita al la Papo Johano Paŭlo la Dua. Valoras ankaŭ rememori, ke en la jaro 2020 Pola Poŝto (Poczta Polska) eldonis la specialan porokazan poŝtkarton kun la bildeto de Dipatrino el Koźle en la eldonkvanto de ok mil da pecoj.

*Janusz Komenda*
*El dumonata revuo Przymierze z Maryją (Alianco kun Maria), n-ro 138/2024*
*Esperantigis Staniław Śmigielski*



*La paroĥa preĝejo de la sanktaj Sigismundo kaj Hedviga en Kędzierzyn-Koźle*

## Preĝo al Dipatrino el Koźle



Virgulino Senmakula Dipatrino kaj Patrino de homoj! Dio en sia providenco elektis vin por doni la promesitan donacon de la savo – Jesuon Kriston, deeternan Vorton de Dio. Li pridonacis vin „plena de graco“. Vi estiĝis Dia Servantino. Sub la kruco vi ricevis la mision esti la Patrino de la tuta homara familio. Vi estas ankaŭ nia Patrino. Via koro kaj brakoj estas malfermitaj por allogi kaj helpi ĉiujn, kiuj alvenas al vi. Ekrigardu, kara Patrino, nin, viajn infanojn, perditajn en ĥaoso de la ĉiutaga vivo venantaj al vi kun la plena konfido kaj amo. Estu por ni vojo al via Filo, kiu estas por ni la fonto de la vivo, mezurilo de la progreso, kuraĝo por malĝojantoj, espero por mortantoj kaj por nia savo.

Ni venas kun konfido antaŭ vian plenestiman bildon, por petegi vian helpon. Apogu per via propeto niajn familiojn, infanojn kaj junularon. Ĉirkaŭigu per zorgo malsanulojn, soleculojn, senlaborulojn, senhejmulojn kaj forlasitojn. Helpu al ni ne perdi la sencon de nia homa vivo, kiam necesas lukti kun zorgo pri ĉiutaga pano. Estu al ni gvidantino sur la vojetoj de nia vivo kaj elpetu ĉe via Filo por ni bezonatajn gracojn.

Plejsankta Patrino de la Sinjoro kaj la Patrino nia, vi estas nia kunhelpantino kaj favorantino ĉe via Filo, repacigu nin kun Li kaj gvidu nin al Li. Amen.

*El la Jubileo de 2000 Jaroj de Kristanismo en Pollando.*
*Elpoligis: eseś*



**ROZARIO**
**kunpreĝado per ZOOM**
**por IKUE, por la paco en Ukrainio, Palestino kaj ceteraj landoj, kie furiozas militkonfliktoj.**
**Ĉiutage je la 20:15 horo (UTC+2)**
**Aliĝu ĉe: ikue.reto@gmail.com**

# PREĜO MALANTAŬ ŜLOSITA PORDO

Mallonga preĝo, kristana kanto – tio, kio por multaj kristanoj estas io laŭkutima – la sekvantoj de Kristo en Norda Koreio povas per tio riski vivon. De multaj jaroj ĉi tiu lando okupas la unuan lokon en Monda Indekso de Persekutoj.

Hee Jin priskribas la vivon post la forkuro al Suda Koreio. Ŝi neniam imagis, ke ŝi povos iradi al preĝejo, legadi Biblion kaj eĉ lerni en la biblia lernejo, la 33-jarulino edukiĝata en Norda Koreio, la lando hermetika, en kiu la estroj de la dinastio de Kim-oj ordonas sin laŭdi kiel diojn, kaj kristanoj estas konigataj kiel la malamikoj de la ŝtato. Malgraŭ tio oni kalkulas, ke en ĉi tiu lando loĝas ĉirkaŭ 300-500 mil da kristanoj, kiuj en neimageblaj kondiĉoj daŭradas en la kredo je Dio. Oni kalkulas, ke ĉ. 50 ĝis 70 mil el ili estas malliberigataj por sia fido.

Ni ne ĉesu preĝadi por Norda Koreio!




***Hee Jin, kiel aspektis la vivo en Norda Koreio, kiam vi estis infano?***

Mi vivis en tre malriĉa familio. La granda malsato komencis, kiam mi estis ankoraŭ infano. Mi portas en mi mem multajn rememorojn pri tio, kiel ofte mi malsatis. Multaj infanoj ne povis frekventi lernejon, ĉar ili estis malmulte nutrataj. Mi mem havis pli multajn malĉeestojn en la lernejo ol la tagojn de la ĉeesto. Multaj homoj mortis kaŭze de la malsato.

***Ĉu vi povas rakonti, kian specon de doktrinizado vi spertis en infaneco?***

En lernejo en Norda Koreio oni instruas ĉefe pri la kreinto de la ŝtato Kim Il Sung, lia edzino Kim Dzong Suk kaj pri lia filo Kim Dzong Il.

Flanke de gelernantoj estas atendata scio pri ĉi tiu familio. En tio konsistas la doktrinizado. Ni estis ekzemple instruataj, ke ni devas danki al Kim Il Sung kaj Kim Dzong Il por ĉio, kion ni ricevas. Oni encerbigadis al ni, ke Kim Il Sung liberigis nian popolon el imperiismo kaj ke Kim Dzong Il disvolvigis ĝin, por ke ni povu edukiĝadi en paco. Je ĉi tiuj argumentoj sin apogas la lerneja edukiĝo.

***Via avino ekkredis je Jesuo en Ĉinujo. Kion vi pri tio scias?***

Mia avino havis la feliĉon elfuĝi por iu tempo al Ĉinio, kie ŝi ekaŭdis pri Jesuo kaj ŝi konvertiĝis. En Norda Koreio miaj geonkloj kaj patrino malpermesis al ŝi paroli pri Dio, ĉar la tuta nia familio povis kaŭze de tio esti murdita. Mi memoras, kiam mia avino ĉiun dimanĉon preĝadis kune kun mi kaj kantadis kristanajn kantojn, kiam mi estis etulino.

***Kiel aspektis tiaj preĝadoj?***

La avino ĉiam ŝlosfermadis la pordon kaj poste dum ĉirkaŭ 30-40 minutoj celebradis sian personan diservon, kantante kantojn kaj preĝante buŝe. Mi kantadis kune kun ŝi, mi fermadis okulojn, kiam ŝi preĝadis kaj mi ripetadis post ŝi: „En la nomo de Jesuo. Amen“. Mia avino ĉiam ŝajnis al mi esti tiel senzorga kaj trankvila, kiam ŝi kantadis kaj preĝadis. Por mi, la infano, tio estis bela.

***Sed la tempo de la preĝado estis tamen tre malsekura?***

Post kiam mia avino akceptis la kredon en Ĉinio, iumomente ŝi estis kaptita

kaj transportita returnen al Norda Koreio. Ŝi transvivis tiam la malliberejan restadon nur pro tio, ke ŝi ne konfesis, ke ŝi kredas je Jesuo Kristo. Post ĉirkaŭ ses monatoj ŝi estis liberigita. Se ŝi konfesus esti kristanino, aŭ se ŝi estus suspektata, la tuta nia familio estus tuj arestota.

Kristanoj ne estas lokigataj en kutimaj malliberejoj, sed en labortendaroj por politikaj malliberuloj – kune kun la tutaj familioj. Se ili trovus la dokumentojn pri kristaneco, ekz. biblion, tuj oni deportus la tutan familion en labortendaron. Ili sendadas homojn al lokoj... kie homoj ne povas loĝi. Se vi unuafoje tien trafus, vi neniam de tie elirus.

***Kion vi opinias, ke la kristanoj en Norda Koreio pleje bezonas?***

El eksterlando estas eblaj disaŭdigoj per radio por ili. Ni povas ankaŭ nepublike preĝadi. Vi preĝadu por la sekureco de tiuj kristanoj. Tio estas la plej valora.

*Leszek Osieczko*
*El Open Doors: W służbie prześladowanym chrześcijanom, 10/21*
*Esperantigis Sławomir Helicumski*

## TEMPO DE KONSCIA ELEKTO

La tempo de mola kristaneco jam finiĝis. Finiĝis la bona vivo. Komenciĝis la tempo de konscia elekto – de mia kiel pastro, de via ĉu vi estas 50-jara, 70 aŭ 20-jara.

La bono estas malfacila, la kristaneco estas malfacila. Dio donis al ni 10 ordonojn. Kaj postiri ĉi tiujn ordonojn postulas penon.

Sed Satano donis al ni nur unu ordonon. Kian? Faru – kion vi volas! Postiri ĝin estas pli facile ol la dek ordonojn… Ĉion vi povas. Ne estas aferoj malpermesitaj. Tial hodiaŭ antaŭ niaj okuloj sovaĝiĝas junaj generacioj. Tio estas satana unu ordono. Kaj tre facile estas postiri ĝin, sed bedaŭrinde la konsekvencoj estos tragikaj.

**Dek konsiloj por la ĉiutaga vivo:**

1. Al ĉiuj bone fari.
2. Fronte al ĉiuj esti pacienca.
3. Unue aŭskulti, kaj poste juĝi.
4. Unue pensi, poste paroli.
5. En kolero silenti.
6. Malfeliĉajn subteni.
7. Por faritaj damaĝoj pardonpeti.
8. Pri neniu malbone paroli.
9. Singardi kontraŭ kalumniantoj.
10. Al klaĉoj ne kredi.

* * *

**Dio en la Sankta Skribo instruas nin, por:**

– ne mortigi – ne priŝteli – ne perfidi – ami homojn – pardoni ilin – dividiĝi kun aliaj – estimi vortojn.

Sur kiaj do valoroj homoj volas konstrui la civilizacion, se tian Dion oni elĵetas el la publika vivo?

Dio estas Amo. Kial do oni elĵetas la Amon el la publika vivo?

### SAĜERO

Ne estas malfeliĉo
doloro kaj malriĉo,
sed vivi en malbono
sen pento kaj pardono.

Kiu oferi scias,
por bon‘ abnegacias,
humilas kaj modestas,
al sav‘ proksima estas.

Ĉar ne en hav-abundo,
sed sur la kora fundo
kreskas la rara semo:
feliĉ‘ kaj kontentemo.

**Jiří Kořínek**

## DEK DU DANĜERAJ MALAMIKOJ, KONTRAŬ KIUJ NECESAS BATALI FAMILIE

**1. Malrespekto al pliaĝuloj**

Malrespekto al pli aĝuloj kaj inversigo de roloj estu malpermesitaj en familio. Ne gravas, la socia pozicio, kion vi povas atingi, la riĉaĵo, kion vi povas havi, la prudento, kion vi povas pretendi, la gepatroj restas gepatroj eĉ se ili estas pliaĝuloj. Estas certa maniero paroli al ili. Malĝentileco, malmodesteco, bati gepatron aŭ pliaĝulon kaj malrespekti ilin restas malbeno, eĉ se vi preĝas.

**2. Malamo**

Malamo estas danĝera en familio, ĉar ĝi kondukas al morto. Kain mortigis sian fraton Habel pro malamo. Malamo estas la bazo de divido, kiu celas havi diverĝajn tendencojn por detrui la familion.

**3. Ĵaluzo**

Ĵaluzo estas la bazo de malamo kaj ĉi-lasta estas nutrita per spirito de konkuro. La beno de unu familiano devus alporti ĝojon al aliaj, ĉar ĝi alportas honoron al familio.

**4. Venĝo**

Ĉi tiu danĝera spirito detruis la familion de Davido. Kie mankas pardono, estas venĝo, ni volas repagi malbonon per malbono kaj preni justecon por starigi nian egoismon. Kaj ofte, venĝo estas kuraĝigita de la malboneco de aliaj familianoj.

**5. Manko de pardono**

Kie ne ekzistas pardono, familio ne povas pluvivi. Kie loĝas homoj, ĉiam estas problemoj, sed estas vera kaj sincera pardono, kiu helpas konservi unuecon familie kaj konservi ĝian benon.

**6. Hipokriteco**

Ni devas lerni diri unu al alia la veron kun amo kaj respekto kaj esti veraj en la familio. Hipokriteco, duobla flanko, perfido, mallojaleco, malfortigas fidon kaj detruas familion. Kiam hipokriteco fariĝas vivmaniero, ne plu ekzistas familio.



*Nelson Mandela - eksprezidento de Sudafrika Respubliko - deklaminto de tiuj ĉi moralaj instigoj*

**7. Maldiskreteco**

Ĉiu familio havas siajn sekretojn kaj siajn proprajn aferojn, kiuj ne forlasas la familian rondon por protekti la unuecon kaj dignon de la familio. Kiam la malpuraĵo, la stultaĵoj de la familio komencas forlasi la privatan rondon de la familio, ĝi estas finita, vi ne plu havas familion. Eĉ se estas aferoj tiel seriozaj kiel ili estas, ili devas esti solvataj ene de la familio, ĉar ja oni diras, ke lavotaĵo estu lavita en la familio.

**8. Divido**

Disigita familio estas venkita familio kaj el la divido de familio nur profitas diablo kaj sorĉistoj. Atentu, estas nematuraj kaj malvirtaj homoj, kiuj decidas pri la dividoj, sed la infanoj de Dio estas nomataj infanoj de la paco kaj do ili devas labori por la unueco de la familio. Malkuraĝigi ĉiujn provojn de divido en familio estas saĝa paŝo, ĉar Dio benas, kie regas unueco.

**9. Malbona konflikta administrado**

La ĉeesto de saĝaj kaj inteligentaj viroj defendas familion antaŭ rompiĝo kaj helpas

solvi multajn konfliktojn, ĉar ĉiuj familioj havas siajn problemojn. Kiam konflikto disigas la familion, tio okazas, ĉar mankas saĝaj kaj maturaj homoj animitaj de vera amo al la familio. La hodiaŭaj infanoj ne konas la signifon de familio, sed saĝuloj devas instrui al ili, ke la familio estas sankta.

**10. Manko de vera amo**

Kie ne estas amo, ne estas familio. Amo estas la sola ligo, kiu kunigas familion. La nuna mondo fariĝis tro materiisma ĝis tia grado, ke ne plu ekzistas vera amo. Tial ne plu ekzistas forta familio.

**11. Sorĉado**

Sorĉado kaj magio estas gravaj malamikoj en familio. Ju pli vi kontraŭbatalas ilin, des pli vi tenas familion, ĉar ili venas por detrui familion. Sed atentu por ne suspekti kaj kalumnii senkulpajn homojn kaj ankaŭ ne uzu la metodojn de la diablo por kontraŭbatali ilin, ĉar ni kontraŭbatalas ilin spirite kaj ne fizike. Malamo riskas meti vin en la tendaron de la diablo kaj redukti la efikon de viaj preĝoj.

**12. Egoismo**

Kiam vi pensas nur pri vi mem kaj ne pri via familio, tio estas danĝera. Egoismo kaj individuismo ne povas konservi familion unuigitan kaj prosperan. Kiam Dio benos vin, pensu ankaŭ pri aliaj membroj de la familio por krei fortan familion, ĉar riĉulo en familio de malriĉuloj estas malriĉulo, kiu ignoras ĝin. Familio estas sankta kaj ne nepre devas temi pri sango.

Nun kiam vi legis ĉion, bonvolu diri „dankon!“ kaj sekvi la boninstigojn en la teksto. La sola konsilo, kiun mi povas doni, estas neniam malboniĝi pro la vivokazaĵoj. Se iu vundis vin, restu rekta kaj sincera malgraŭ ĉio, ĉar ĉio devas esti pagita en la vivo. Neniam ŝanĝiĝu pro homoj, restu forta kaj restu rekta. Fratamo daŭradu!

*Por legantoj de Dio Benu disponigis*
*Honoré Sebuhoro el DR Kongolando*

## EROJ EL PASINTECO: AVO KAJ NEPO

Tiun kortuŝan kovrilpaĝon lokigis la pola monatrevuo Przewodnik Katolicki (Katolika Gvidanto) en la unua septembra numero de la jaro 1934. En la troviĝanta priskribo en ĉi tiu revuo oni povas legi: „Sufiĉas ekrigardi personojn de avo kaj nepo por ekvidi, ke ili preĝas. Ĉu povas esti pli bona lernejo?“




Kiam ni rigardas ĉi tiujn personojn, ni ne povas ne demandi: Kun kiuj homoj ni volus kunvivi kaj kunlabori – ĉu kun tiuj, kiuj sciipovas tiel preĝi kaj kredi, aŭ kun tiuj, kiuj perdis la kredon je Dio kaj la preĝo? Ni devas respondi al ni mem, ke eĉ ateisto havus pli grandan fidon ol la preĝantaj kaj kredantaj homoj. Forpreni de homoj Dion, tio signifas forpreni de animoj ne nur la eternan celon kaj supernaturajn fortojn, sed forpreni ilian modelon. Ĉar preĝi signifas formiĝi laŭ la modelo, do laŭ la ekzemplo, kaj ĉi tiu modelo la plej perfekta povas esti por homo nur Dio.

Homaj modeloj pasas kaj velkiĝas, sed la Dia modelo ne forpasas kaj sian lumon senfinan ĝi ne perdas. Tia estas la Dia lernaĵo. Ĝi estas la lernaĵo kun la plej perfekta modelo“.

Kiel aktualaj estas ĉi tiuj vortoj nuntempe.

*(mk)*

*El Semajnrevuo SIECI, 9-15.09.2024*
*Elpoligis Stanisław Śmigielski*

# KREDO DE ATEISTOJ

Laŭ la opinio de Silvana De Mari la akcepto de ateismo postulas la kredon je la realeco, kiu kontestas ĉiujn principojn de sciencaj reguloj kaj difinas la perforton de la homara prudenteco.

Ateismo estas la tuteca kontraŭracieca ideologio – asertas la itala verkistino Silvana De Mari, unu el la plej popularaj en la mondo aŭtorinoj de la libroj por infanoj kaj por junularo. Ŝiaj beletraĵaj sagaoj envicigitaj en la fluon de heroic fantasy (interalie la ciklo „Lasta elfo“, „Lasta nanulo“ kaj „Lastaj sorĉadoj“) ĝisatendis tradukojn al dekkelkaj lingvoj, ankaŭ al la pola lingvo. Lastatempe la aŭtorino ofte esprimiĝas al la mondkonceptaj temoj. Ŝi argumentas ekzemple, ke se iu sin opinias kiel ateisto, do tiu devas agnoski kiel veraj tri asertojn, kiuj estas malsciencaj, kaj eĉ absurdaj: 1) ĉio formiĝis el nenio, 2) ordo naskiĝis el kaoso, 3) tio, kio estas organika, naskiĝis el tio, kio estas malorganika.(...)

Silvana de Mari estas preparita por la interparoloj pri ĉi tiuj temoj, ĉar ŝi posedas la kuracistan kleriĝon. Ŝi estas laŭreatino de la medicina fakultato de la universitato en Torino, kie ŝi specialiĝis en kirurgio, endoskopio kaj psikologio. Antaŭ ol ŝi komencis la beletran karieron, ŝi laboris en malsanulejoj en Italio kaj Etiopio. Krom tio, kiel ŝi mem asertas, ŝi estis dum duono da jarcento ateistino kaj darvinistino. Ŝia ateismo kaj darvinismo tamen ne posedis la sciencan aspekton. Ŝia malkontento al Dio fontis el tio, ke Li permesas la suferadon de senkulpuloj. Ŝi ne povis konsenti pri ekzisto de la Kreinto, vidante en la onkologiaj fakoj de hospitaloj la infanojn mortantajn je kancero.

La turnopunkton en ŝia vivo alportis nur la ekkono de la rezultoj de la esploroj de la Torina Mortotuko. Ŝi estis la homo de menso, sed ne de kredo, de la scienco, ne de la religio. Pro tio ŝi ne fidis al publikaj komentarioj same apologiaj kaj kritikaj kontraŭ la menciitaj relikvoj, sed ŝi absorbiĝis en la fontojn kaj ŝi detale trastudis la rezultojn de ĉiuj sciencaj espoloroj rilatantaj ĉi tiun linan tolon. Surbaze de tio ŝi venis al la konvinko pri la aŭtentikeco de la entombiga mortotuko el la jerusalema tombo de Jesuo.



*Silvana De Mari*

Tia malkovro iĝis por ŝi la komenco de la malkovrado de la kristanismo (simile kiel ĝi estis la impulso por konvertiĝoj de aliaj sciencistoj esplorantaj la Mortotukon, kiel al Ray Rogers, Allan Wagner aŭ August Accetta). La teksaĵo kun la bildo de la turmentigita viro estiĝis por ŝi la respondo je la starigata demando pri la turmentado de senkulpulo kaj estado de la malbono en la mondo. Ŝi ekkomprenis, ke Kristo, kvankam Li mem estis senkulpa, libervole akceptis sur sin nepriskribeblajn turmentojn kaj torturojn, por ke ĉiu, kiu eksentis la nekulpitan doloron, povu esti konsolita por la eterneco. En ĉi tiu perspektivo la morto estiĝas la transiro al senlimo, kie ĉiu doloro estos mildigita, kaj ĉiu malbono riparigita.

Ĝuste tiam, kiam la verkistino akceptis la kristanan kredon, ŝi ekkomprenis, kial ŝi ĝis tiu ĉi tempo tiel forte akceptis darvinismon, malgraŭ tio, ke ĝi ne estis defendebla el la scienca vidpunkto. Jen la teorio de

Darvin estis ŝia centra apogilo, kiu subtenadis ŝian ateismon. Ŝi persistadis en ĝi ne kaŭze de raciaj kialoj, sed tial, ĉar pere de ĝi estis ekskuzata neado de ekzisto de Dio.

Iuj asertas, ke homo estis kreita je la bildo kaj simileco de Dio, la aliaj, ke homo evoluiĝis je la bildo kaj simileco de simio. Malantaŭ unu kaj alia konvinko staras du diversaj kredoj. Laŭ la opinio de Silvana de Mari nur la unua havas la racian apogon.

*Grzegorz Górny*
*El Semajnrevuo SIECI, 7-8/2024*
*Esperantigis Stanisław Śmigielski*

## MALBONŜANCAJ ATEISTOJ

Se mi estus ateisto, mi ekmortus pro la timo. Eble ne en la aĝo de tridek jaroj, ĉar tiam al homo ŝajnas, ke li vivos eterne, sed post kvindeko min pleniĝadus la timo antaŭ morto. Ĉiutage mi vekiĝadus ektimigita (se mi entute estus en la stato ekdormi) pri laŭvica tago, kiu proksimigas min al la fino de ĉio – de mia estado, kaj ankaŭ de la ekzisto de la mondo. Ĉar se mi malestos – la lasta spiro, malpleneco, grizeco kaj nenieco – same bone povas malesti ĉio. Vidalvide de ĉi tiu perspektivo homo ne havas la forton ekmovi la manon – nu kiucele do, se ĉio estas kondamnita je ruiniĝo, traputriĝo kaj malesto. Restos post mi nenio, kio finfine ne ŝanĝiĝos je pulvoro kaj polvo...

Pro tio, kvankam ateistoj entute ne vekas mian simpation (kvankam mi konas kelkajn honestulojn), antaŭ ĉio mi bedaŭras ilin. Ili estas kompatindaj homoj (malgraŭ ofte kun la dika monujo), tamen ili havas nenion.

Ĉar entute ne estas tiel, kiel oni povus laŭŝajne al si imagi, ke ni, kristanoj, kredas kaj tio donas al ni sensentigan komforton, kaj ili, spektante prudente, vidas la realecon en ĝia reala formo. Efektive estas tute inverse: tion ni scias, kaj ili kredas. Ni firme scias – konante la tutan veron pri la temo de la mekanismoj de la vivo kaj morto – ĉar nian scion ni ĉerpas el la absolte certa Fonto de la Vero; kaj ili insiste, despereme kredas per la blinda kredo de Hobbes, Spinoza, Feuerbach, Nietsche kaj Marx.



Ni scias tutcerte, ke nur post la fino de la surtera ekzistado atendas nin la vera vivo (aŭ la vera morto, kiu havas nenion komunan kun la dializo de la korpa histo). Ni scias tion spite de ĉiu dubo, ĉar la Plejsupera Aŭtoritatulo ne nur al ni tion garantiis per la propra Vorto, sed eĉ konfirmis tion per la nekontestinda fakto. Ili kontraŭe persiste klinas sin al la mito kreita fare de la degeneraj homoj (aldone tre ofte malvirtaj kaj mensogemaj).

Je ateistoj tamen ne valoras indiĝniĝi – malgraŭ tio, ke iliajn nocivajn agadojn senkondiĉe oni devas kontraŭbatali. La ateistojn oni devas antaŭ ĉio kompati. Kaj preĝi por ili, por ke ili reakiru vidkapablon. Ĉar bedaŭrindaj ili estas – ili ankaŭ estas la kreituloj de Dio.

*Jerzy Wolak*
*El Dumonata revuo Przymierze z Maryja (Alianco kun Maria), n-ro 133/2023.*
*Elpoligis Stanisław Śmigielski*

**Sukcesa puno**

– Ĉu vi jam havas ian programon aŭ planon por la unua tago, kiam vi liberiĝos? – demandas la malliberejestro.

– Eĉ du planojn mi havas, sinjoro direktoro! Unu bankon kaj unu juvelejon...

# PRI ARBO KAJ BIRDO

Foje okazis, ke el tero elŝosis kreskaĵeto. Tiom ĝi ĝojis pro aero kaj lumo, ke per ĉiuj fortoj ĝi disvolvis siajn ŝosojn kaj estis ĉiam pli kaj pli granda. Post nelonge jam tie staris arbeto kun subtilaj branĉetoj kaj belege verdaj folietoj.

Sed iun tagon la arbeto siajn ŝosojn malgôoje mallevis al la tero. Rimarkis tion birdo, kiu en tiu ĉi regiono ŝatis kantadi en arbokronoj. Li alflugis sur unu branĉeton demandante la malgrandan arbeton, kio al ĝi okazis.

„Ah“, plendis la arbeto, „mi ne plu volas kreski. Kiam mi tiel ĉirkaŭ mi observas ĉiujn tiujn grandajn, dikajn kaj belajn arbojn, kiel ili elmontriĝas siajn branĉegojn supren al blua ĉielo, ĉiam mi ekpensas: „Tion mi neniam kapablos!“

La birdo ankoraŭ momenton balanciĝis sur fleksema branĉeto. Fine ĝi diris: - „Vi devas esti paciencema. Ĉiutage vi ricevas tiom da sunbrilo, pluvo kaj vento, ĝuste tiom, kiom vi bezonas. Akceptu tion kaj estu kontenta. Tio cetera jam venos mem.“

*Laŭ Helmut Jaschke*

Humuro de Makso





**„Mia kara malsanulino, en ĉiu tablojdo estas ankaŭ peceto da via kuracisto.“**

Ilustraĵo de Jan Horalecký

## KREDU

### El libreto Dek paŝoj al ĝojo, 2020, de la aŭtoro Sac. D-ro Max Kašparů

Ekzistas diferenco inter kredado, fido kaj kredo.




Kredado povas koncerni veterprognozon, fido estas kunigita kun apogo je vorto de alia homo kaj la kredo estas viva rilato. La rilato inter homo kaj Dio.

Homo estas esence malfermita al mistero de absoluto. Se li en si la absoluton forstrekas, la liberigitan spacon okupas aliaj, relativaj aferoj, el kiuj li faras novan absoluton. Tio povas esti progreso, tio povas esti politika partio, tio povas esti sekso, kariero, mono... Tion la Biblio nomas idoladorado. Kaj ĝuste de tio estas la nuntempa mondo plena.
Kio estas la kredo?

Tasko de la kredo ne estas kvietigi soifon pri certeco kaj sekuro, sed instrui nin vivi kun mistero. La kredo estas kuraĝa, riska paŝo de nia libero trans mallarĝa sfero de tio, kio estas sekurigita kaj per pruvoj certigita. Kredi, doni ŝancon al kredo, ne signifas senigi nin de racio, sed de orgojlo de la intelekto; doni spacon al la kredo signifas liberigi nin de iluzio, ke la profundon de la vero ni povas plene kapti per nia sciado kaj transigi ĝin en nian posedon kaj reĝisoradon. Al la kristana kredo apartenas ĝojo, kaj precipe sana kaj sencohava libero de la homspirito. La kristanismo estas vivinspiro kaj la kredo estas baza trajto de la homekzistado.

La kredo estas aventuro, kiu baziĝas je la kuraĝa paŝo en nubon de Mistero, kaj ĝi do estas pozitiva respondo de la alvoko: „Forŝovu ĝis profundo.“

La sana kredo, diference de la morbida, patologia, distingiĝas per tio, ke ĝi kontribuas al disvolvo de personeco, ĝi subtenas harmoniajn rilatojn kun aliaj homoj, ĝi distingiĝas per malfermiteco al vivrealo, ĝi ne kaŭzas timon, ĝi kapabligas plurisman toleremon, ĝi konservas starpunkton de serĉado, ĝi havas individue diferencan skalon de la krea forto, ĝi donas spacon por bonhumuro kaj por festado.

Ni kredu! Por nia propra ĝojo.

**SANKTA JOZEFO, LA LABORISTO**

Jozefo, sankta justa viro,
silenta, de malmulta diro,
modesta, tamen vir‘ de faro,
kun forta kredo, firma staro;
ne militisto, ne soldato,
sed ĉiam en obea stato
al la ordonoj de l‘ Sinjoro.
Vi estis viro de laboro!

Ekzemplo via, jen instruo,
ke ne en pozo, ne per bruo
montriĝas de la virto digno:
humilo estas ĝia signo;
kaj ne milita gloro vanta,
sed koro ĉasta, Di-amanta
nin vokas al pli alta celo:
labor-fervor‘ en Krist-fidelo!

*Walter Mudrak, Aŭstrio (EK 1982)*

# LA PLEJ NECESA SCIENCO

Ekzistas diversaj sciencoj, teoriaj kaj praktikaj, eĉ multspecaj. Riĉa estas la naturo, la homo kaj ties vidpunktoj, laŭ kiuj li interesiĝas, esploras la universon. Ĉiu scienco kun siaj branĉoj valoras kaj utilas al la kulturo kaj la homa vivo. Sed neniu homo povas ekposedi ĉiun scion. Oni devas elekti nur parteton de la scienco, kiu estas necesa por propra profesio. Reston oni devas postuli de la specialistoj.

Estas tamen unu speco de scienco, rilate al kiu neniu povas esti indiferenta. Ĉiu homo, simpla aŭ klerigita, devas koni ĝin, ĉar de ĝi dependas lia persona kaj la socia sorto, kaj ne nur la surtera. Ĝi nomiĝas "Etiko" aŭ "Moralo". La scienco estas por ĉiuj. Ĝi instruas nin, kiel ni devas konduti en ĉiuj situacioj. Ĝi dissolvas dubojn kaj timojn en nia agado, pridonacas nin per la interna paco kaj certeco de nia faro.

Kie troviĝas fonto de la morala ordo? La moralo elkreskis el la homa racio. Homo kiel pensanta, prudenta estaĵo prijuĝas propran konduton kaj de la aliaj. Tiam facile li povas rimarki, ke io konvenas al la homaj naturo kaj digneco. Tion li nomas bona. Ĉio alia restas morale malbona. La konscienco diras al la homo, ke bonaj agoj estas farendaj kaj la malbonaj evitendaj.

Simile juĝas ĉiu societo: aprobas bonon, kondamnas malbonon. Ofte tamen okazadas, ke homoj eraras en la morala aprezado de la faktoj. Iuj homoj eĉ ne volas agnoski moralajn leĝojn devigaj. Ili kondutas laŭ kaprica plaĉo.

En tiu duba senvojo Dio mem decidis helpi al la homaro, instruante ĝin iri sur la sekura vojo, pere de la Revelacio. Jam longe antaŭ Kristo la judaj profetoj proklamis la Dian leĝon, la Dekalogon. Fine Kristo mem, la Filo de Dio, plenigis ĝin, perfektigis kaj transdonis al sia Eklezio, por instrui ĝin al ĉiuj homoj sur la tero.

La tuta Sankta Biblio, sed precipe la Nova Testamento, estas la lernolibro de la kristana moralo, entenanta leĝojn kaj vivajn ekzemplojn de la agadmaniero. Tial ĉiu kristano volante honeste vivi, povas tie trovi la bezonatan instruon. Krome, en la eklezia literaturo, predikoj kaj konfesejoj oni aldone povas trovi la necesajn klarigojn.

Kvankam la morala vivo, konforma al Diaj ordonoj, estas ofte malfacila, tamen ĝi estas ankaŭ tre profita. Homo morale bona, justa, sankte vivanta, ĉiam sentas amikecon de Dio kaj de la homoj. En sia konscienco homo portas pacon, kuraĝon kaj ĉio pro la Dia graco. Tian feliĉan homon ni nomas religia.

Se ni volas religie vivi, ni devas unue scii, kio estas honesta kaj farenda, kaj due, ekzerci nian liberan volon, ke ĝi ne hezitu, kiam oni devas elekti inter la malfacila bono kaj la ĝua malbono. Por persisti en la bono necesas la Dia graco, kiun ni ricevadas preĝante. Tiamaniere, venkinte la malvirton, ni suriros la bonan vojon, kiu kondukos nin al la "vivo eterna" al la "Dia Regno".

*Sac. Stefano Motyka*
*Por DB Sac. Stanisław Płachta OFM*

**Kiel kontraŭ diablo?**

La rimedo por humiligi satanon, kiam li en ni ekscitas malamajn pensojn rilate tiujn, kiuj al ni agis maljuste, estas la rapida preĝo por ili. Tiel venkos bono kontraŭ malbono, tiaj estas la sanktuloj.

***S-ta Johano Maria Vianney***

Tamen li estis vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis. *Jes 53,5*

# DIABLA MAJSTRAĴO

Okazis konsiliĝo en infero. Kiam la inferĉefulo prijuĝis akiritajn rezultojn, li estis tute malkontenta: „Tio estas malzorgemeco, vi devas intensigi agadojn!“ li ekkriegis al ceteraj diabloj. Kaj poste per venĝminaca voĉo li ekgrakis: „Mi volas vidi sisteman kaj efektivan laboron.“

Post iom da tempo okazis plua konsiliĝo, en kiu devis la partaj inferuloj prezenti siajn strategiojn.

Kiel la unua alpaŝis unu diablo memkonscie diranta: „Estro, mi havas planon – kaj jam mi ĝin praktike ekfunkciigis. Mi disvastigas ateismon. Al homoj mi kredigas, ke kredo estas sensencaĵo; ke Sinjoro Dio ne ekzistas, kiam lin neniu vidis. Mi primokas ilin, ke la kredo estas konvena nur por malgrandaj infanoj aŭ por maljunulino.“

„Pli bona io ol nenio,“ ekdiris ne tro kontenta inferĉefulo. „Sed bone, kelkajn stultulojn oni tiel kaptos.“

La dua diablo fanfaronis: „Malmoraleco! Tio estas la ĉefa vorto por sukceso. Tio estas tagdevizo! Mi per ĝi parazitigis ilian imagkapablon per diversaj malmoralaĵoj. Kaj nun tio progresas aŭtomate: ekde imagoj al malmoralaĵoj. Kaj kiu vivas malmorale, tiu volas, ke Dio ne ekzistu – por ne vidi lin. Kaj poste tiu kredas eĉ tiujn sensencaĵojn, kiujn ĉi tie antaŭ la momento prezentis la kolego. Kaj aŭ pri Dio por certeco li tute ne pensas...!“

„Tio ne estas malbona,“ laŭdis lin la inferĉefulo. „Sed io al tio ankoraŭ mankas. Tio ĉio rilatas konstante nur homojn el nia ‚agadkampa zono‘, do tiujn, kiuj ĉi tie pli malfrue verŝajne aperus same kiel ni... – Sed ni devas kapabli labori eĉ kun klopodegaj kazoj!“

La konsiliĝo plu daŭris kaj estis diritaj ankoraŭ multaj proponoj.

Poste sin aliĝis plua diablo. Ruzlerte li ekgrimaĉante diris: „Kie mi povis, mi elserĉadis piajn animojn kaj mi flustradis al ili: ‚Vi devas bridi malbonajn sopirojn kaj priregi siajn voluptojn, kiuj – kiel vi mem vidas – huntas vian vivon. Vi devas plene realigi tion belan, al kio vin invitas Jesuo. Vi povas sanktuliĝi! – Sed tio estas ege malfacila. Pli volonte komencu tion ĝis morgaŭ...!‘“

La inferĉefulo kontente ekgruntis: „Tio estas genia! Tio estas laŭvorte la infera majstraĵo!“ • • • Se vi klopodos sanktuliĝi, sed „nur morgaŭ“, neniam vi sanktuliĝos!

*La okazaĵon por enpensiĝo preparis Sac. Pavel Zahradníček (ĝustigita laŭ samizdata teksto de la nekonata aŭtoro). Tradukita laŭ teksto aperinta en la revuo Milujte se (Amu vin) n-ro 44/2018.*

**Intima dialogo:**

“Kiu donacis al vi tiun fingringon?”
“Mia bona amiko.”
“Kaj ĉu tiun novan mansaketon ankaŭ?”
“Tiun mi ricevis de alia amiko.”
“Kaj kies estas tiu infaneto en la ĉareto?”
“La cikonio ĝin alportis al mi.”

**DIO BENU** Vydavatel: IKUE-Katolická sekce Českého esperantského svazu. Adresa redakce: IKUE-Katolická sekce ČES, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice. Zodpovědný redaktor: Miloslav Šváček, tel. +420 732 420 675, e-mail: m.svacek@seznam.cz. Bank. spojení: FIO banka, a.s., Přerov, číslo účtu: 2700247564/2010. IBAN: CZ4420100000002700247564 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX. Ročník 2025 (35) - číslo 1 (137).
Registrační číslo MK ČR: E 12647. ISSN 1803-8387 (Print), ISSN 3029-701X (On-line).

# KANTLAŬDEGU ĈIU LANGO

## Pange, lingua

Teksto s-ta Tomaso Akvina († 1274)

Melodio J. Förster, 1858 — Tradukis Sac. Jan Filip




2. Sakramento sole estu / adorata nun de ni, / anstataŭ Malnova festu / ni Nov-leĝon nur de Di´! / Kredo kompletigo restu / en ĉi tiu misteri´!

3. Al Naskinto eĉ Naskito / laŭdkantad´ eĉ la ĝojeg´, / sav´, honoro, grandspirito / estu eĉ la glorbeneg´! / Al el ambaŭ Eliranto / estu sama la laŭdeg´!

